

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №12



Internacia sendependa magazino en Esperanto. 2018. №12 (290)

Ekde 2017 *La Ondo de Esperanto* aperas nur elektronike, kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiumonate, krom aŭgusto. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redaktas: Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj: Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro), Peter Baláž, István Ertl, Irina Gonĉarova, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Paŭlo Moĵajevo, Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <http://esperanto-ondo.ru>, <http://sezonoj.ru>

Perantoj. Vidu la liston sur p. 66-67.

Abontarifo por 2019

Internacia eŭra tarifo: 15 eŭroj

Internacia dolara tarifo: 17 usonaj dolaroj

Pollando: 60 zlotoj

Ruslando kaj Belarusio: 850 ruslandaj rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represo: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2018, №12 (290).

Ежемесячный журнал на языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ №77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 4 декабря 2018 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Temo	5
Halina Gorecka. La Esperantisto de la Jaro: la projekto daŭras	6
Eventoj	7
Peter Baláž. Poliglotoj konferencis en Slovenio	8
Chielismo Wang Tianyi. IKEF: Aktivaj eŭropanoj mankas	10
Liba Gabalda. La lasta Internacia Semajno en Katalunio	11
Anna Striganova. UEA reprezentita en Moskvo	12
Heinz-Wilhelm Sprick. Komputiloj kaj katedralo en la 15a Rata Rendevuo	13
Hermann Kroppenber. Intensa kurssemajnfino en Sundern	14
Hans DJ4PG. Esperanto sonas en la etero	14
Koko Poso. Klaĉ-Kunveno Post-Somera	15
Invitu la Universalan Kongreson en 2021 aŭ en 2022	15
Alfred Heiligenbrunner. Migrado ĉe landlimo	16
Bill Chapman. Memore pri Applebaum.	17
Martin Schäffer. Elektro de komitatoj B de UEA: kandidatiĝu!	18
Amri Wandel. En 2019 AIS studad-sesios en Baltio	19
Povilas Jegorovas. La Organiza Komitato de BET-55 definitiviĝis	20
Kaŝi koncertos en Panevėžys	23
Nekrologoj	23
Koncize (11 informoj)	24
Tribuno	25
Vytautas Šilas. Kial veni al Panevejo?	26
Carlo Minnaja. Nobelo aŭ stultaĵo?	30
Peter Baláž. Multlingva akcelilo: EU-projekto por instrui Esperanton al infanoj	32
La 75-a IJK okazos en Slovakio	33
Zlatko Tišljar. La ĝenerala scio pri Esperanto estas pli malpli nula.	34
Lu Wunsch-Rolshoven. Ne per iu paŝego, sed per multaj etaj paŝoj.	34
Arkivo	35
Aleksander Korĵenkov. Zamenhof protestas, aŭ: Neokazinta sensacio	36
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en decembro 2018.	39

Kulturo40

Aleksandr Solĵenicyn. Unu tago de Ivano Denisoviĉ (Trad. el la rusa Aleksander Korĵenkov)	41
Stanislao Belov. Ĉarma frandaĵo por romantikuloj (Recenzo: Zuska Stožická. <i>Ĝis tien</i>)	56
Povilas Jegorovas. Granda vortaro aperis en Litovio	58
Marija Beloŝeviĉ. Omaĝe al Lucija Borĉiĉ	59
AIKo. Quo vadis, <i>Heroldo</i> ?	60
Ricevitaj gazetoj	61

Mozaiko62

István Ertl. Unuvokalaj verkoj	63
Dialogoj ĉe la festa abio	64
István Ertl. Spiritaj splitoj kaj preskeraroj	65
Kiel aboni <i>La Ondon</i>	66

Kovropaĝo: La kovropaĝa pentraĵo “Vintro” (1873) de Aleksej Kondratjeviĉ Savrasov (1830-1897) estas tre aktuala, jam antaŭ kelkaj semajnoj plejparton de Ruslando kovris neĝo. Decembro estas monato de skiado kaj sledado (ve al niaj abonantoj en Aŭstralio kaj Suda Ameriko!), monato de gajaj festoj, tempo por Kristnaskaj familiaj renkontiĝoj. Jarfino donas oportunan eblon por plani la vivon en la baldaŭ venonta jaro kaj, ekzemple, daŭrigi la abonon de *La Ondo de Esperanto*. Ĉu vi jam faris tion?

Ni en la reto:

La Ondo de Esperanto: <http://esperanto-ondo.ru/Ind-ondo.htm>

Abono 2018: <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Elŝuteblaj libroj: <http://esperanto-ondo.ru/Libroj/Libroj.php>

Novaĵretejo La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Radio Esperanto: <http://radio.esperanto-ondo.ru/>

Halina en FB: <https://www.facebook.com/halina.gorecka.3>

Aleksander en LJ (ruse): <http://sezonoj.livejournal.com/>

Ruslingva informretejo: <http://rusa.esperanto-ondo.ru/>

Temo



Ekzakte unu jaron post la apero de la pasintjara decembra *Ondo* ni aperigas en la sama rubrikaĝo la saman foton kun la sama teksto (ni nur ŝanĝas la numeralojn): “... komenciĝas la voĉdonado por la Esperantisto de la Jaro 2018. La nomon de la dudek-unua laŭreato de ĉi tiu honora titolo vi legos en la januara *Ondo*. Kiu, laŭ vi, estos proklamita ĉi-jare?”

La Esperantisto de la Jaro: la projekto daŭras

Antaŭ dudek jaroj la redakcio de *La Ondo de Esperanto* iniciatis ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Per ĉi tiu honora titolo estas distingata(j) persono(j), kiu(j) en la koncerna jaro plej multe kontribuis al Esperanto. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj. Nun la elektokomisiono konsistas el 18 kandidatigantoj kaj 17 elektantoj. Ĉi tiu komisiono havis jam dudek laborsesiojn kun jena rezulto:

- 1998. William Auld
- 1999. Keppel Enderby
- 2000. Hans Bakker, Mauro La Torre, Jouko Lindstedt
- 2001. Osmo Buller
- 2002. Michel Duc Goninaz
- 2003. Dafydd ab Iago
- 2004. Helmar Frank
- 2005. Povilas Jegorovas
- 2006. Bertilo Wennergren
- 2007. Peter Zilvar
- 2008. Ilona Koutny
- 2009. Aleksander Korĵenkov
- 2010. Katalin Kováts
- 2011. Dennis Keefe
- 2012. Peter Baláž
- 2013. Mark Fettes
- 2014. Mireille Grosjean
- 2015. Chuck Smith
- 2016. Stefan MacGill
- 2017. Trezoro Huang Yinbao

Dum la dudek-jara sekretariado mi havis ne nur la taskon kunordigi la komisionon, kio ne ĉiam estis facila pro neperfektaj komunikiloj, sed ankaŭ la plezuron anonci la nomojn de la laŭreatoj kaj la honoron esti la unua gratulanto de ĉiu nove elektita “heroo de la jaro” nome de nia internacia teamo.

Ekde la dudek-unua elekto la sekretariadon de la projekto prizorgas la vicredaktoro de *La Ondo de Esperanto*, konata esperantista kaj socia aktivulo Paŭlo Fischer-Kotowski, kiu je la Zamenhofa Tago anoncos la nomon de la Esperantisto de la Jaro 2018. Mi dankas ĉiujn nunajn kaj eksajn komisionanojn pro la multjara kunlaboro kaj kunlaboremo.

Sukcesan laboradon!

Halina Gorecka

Eventoj



Danke al la nelacigebla Peter Baláž kaj aliaj teamanoj de E@I, Esperanto hejmiĝis ne nur en Polyglot Gathering (Poliglota Kunveno), iam fondita kaj nun gvidata de esperantistoj, sed nun ankaŭ en Polyglot Conference (Poliglota Konferenco), kiu ĉi-foje proponis al la poliglotoj elementan kurson “Fenestro en Esperanton” de Judith Meyer (vidu supre) kaj Esperanto-kurson por progresantoj de Peter Baláž. (Foto: Peter Baláž)

Poliglotoj konferencis en Slovenio

Renkontiĝoj de plurlingvemuloj (poliglotoj) iĝas pli kaj pli popularaj. La unua, kiu komencis la tradicion de ĉiujara renkontiĝo de homoj, kiuj ŝatas aŭ eĉ amas lerni diversajn lingvojn, estas Poliglota Konferenco (Polyglot Conference). Ĝin fondis kaj organizas du famaj poliglotoj: Richard Simcott kaj Alex Rawlings. La konferenco okazas ĉiujare en alia lando, simile al nia Universala Kongreso. Ĉi-jare ĝi okazis la 26-28an de oktobro en la ĉefurbo de Slovenio, Ljubljano kun ĉ. 350-400 partoprenantoj.

La evento estis bunta je prilingvaj prelegoj kaj “uzinoj”. De vendredo ĝis dimanĉo oni diskutis diversajn lingvo-rilatajn temojn, prelegis, instruis. La konferencon ĉefprizorgas eble la plej fama nuntempa poligloto Richard Simcott, brito loĝanta en Makedonio, kiu kapablas komuniki en 30-35 lingvoj, ankaŭ en tre bona Esperanto!

Ege agrabla surprizo estis la relative granda spaco, dediĉita al Esperanto. Okazis unu prelego pri la lingvo kaj du uzinoj. Krome haveblis riĉa Esperanta libro-servo, kiun mi disponigis surloke. La prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio Seán

Dum la podia diskuto en Ljubljano (Foto: Peter Baláž)



Ó Riain prelegis pri “Lingvo Akcelilo: priskribo de pionira lingvolerna projekto” (pri ĉi-projekto vidu apartan artikolon en ĉi-numero de *La Ondo*, p. 32-33). Judith Meyer gvidis kurson por komencantoj “Fenestro en Esperanton”. Mi mem gvidis la kurson de Esperanto por progresantoj. Judith Meyer surloke subskribadis la nove eldonitan lernolibron de Esperanto por anglalingvanoj *Complete Esperanto* de la fama eldonejo *Teach yourself*, kiun ŝi kunaŭtoris kun Tim Owen.

Estas tre bone, ke Esperanto estu pli kaj pli videbla en ĉi-specaj eventoj. Ja poliglotoj estas homoj tre proksimaj al nia movado laŭ la malfermiteco, scivolemo kaj lernemo, do ili estas bonaj aliancanoj por ni, kaj multaj el ili lernas Esperanton kaj iĝas aktivaj en la movado.

Indas mencii, ke danke al la Poliglota Konferenco naskiĝis du aliaj: LangFest en Montrealo kaj Polyglot Gathering en Berlino. En ambaŭ estas envolvitaj esperantistoj, kaj Polyglot Gathering (Poliglota Kunveno) eĉ estis fondita kaj gvidata de esperantistoj. Dum la tri lastaj jaroj ĝin organizas la teamo de E@I en Bratislavo. Tiel ĉi esperantistoj kontribuas al lingva diverseco, prilingvaj diskutoj kaj samtempe verbas por Esperanto. La Poliglota Kunveno nun estas la plej granda renkontiĝo de plurlingvemuloj en la mondo – kaj eble parte pro tio, ke ĝi iom imitis la programon de Esperanto-renkontiĝoj kaj adaptis ĝin por la poliglota publiko.

Se vi emas iam viziti iun el la grandaj renkontiĝoj de poliglotoj, vi havas plurajn eblojn: fine de majo 2019 okazos la Poliglota Kunveno en Slovakio, en aŭgusto LangFest en Kanado kaj en oktobro la Poliglota Konferenco en Japanio.

Konklude

Malgraŭ la malkresko de la membraroj en plejparto de la Esperanto-organizaĵoj ja ekzistas interesiĝo pri Esperanto – eĉ se oni devas pli malfacile (kaj alimaniere) serĉi la interesiĝantojn por ĝi. Unu el taŭgaj lokoj, kie tiaj homoj troviĝas abunde, estas diversaj renkontiĝoj de poliglotoj – kaj, kiel organizanto de la Poliglota Kunveno kaj kiel partoprenanto de la Poliglota Konferenco, mi rekomendas aktive partopreni ĉi-specajn aranĝojn kaj uzi la eblon informi pri “nia lingvo” al tiuj, kiuj efektive amas lerni lingvojn.

Pli da informoj (angle): <http://polyglotconference.com>

Peter Baláž (Petro)
E@I-kunordiganto

**La eldonanto kaj la redaktoro de “La Ondo de Esperanto”
partoprenos en la Berlina Zamenhoffesto
kiu okazos sabate, la 15an de decembro 2018
<https://esperanto.berlin/de/>**

IKEF: Aktivaj eŭropanoj mankas

La 2-4an de novembro okazis la 2a Komuna Konferenco de Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio en la urbo Ĉanzuo, invitita de IKEF-Ĉinio. Samtempe okazis la jarkunvenoj de IKEF-Ĉinio kaj IFEF-Ĉinio (fervojistoj). La komunan malfermon ĉeestis ĉ. 130 esperantistoj el Aŭstralio, Ĉinio, Japanio, Koreio, Pollando kaj Usono, reprezentantoj de la lokaj registaro kaj universitato, ĵurnalistoj el Ĉina Radio Internacia kaj *El Popola Ĉinio*. Ĉar dum la lastaj jaroj la Ĉinia prezidanto Xi Jinping ofte parolis pri konstruado de homarfutura komunumo, IKEF-Ĉinio proponis la ĉeftemon “Konstruado de homarfutura komunumo kaj apliko de Esperanto”.

La vicprezidanto Ludoviko Zhao Chenghua gvidis la prelegan programon. La prezidanto Chielismo Wang Tianyi faris la agadraporton pri 2018. Li raportis pri gravaj eventoj en IKEF kaj menciis ses aktivajn landajn filiojn de IKEF en Ĉinio, Koreio, Japanio, Aŭstralio, Mongolio kaj Sud-Afriko, kaj 24 aktivajn IKEFanojn en aliaj landoj. Poste landfiliaj delegitoj prelegis pri siaj agadoj kaj konkurencaj varoj. La prelegoj kaj ofertoj estas tre aktivaj, ĉar inter ili aktivas junaj IKEFanoj. La celo de IKEF estas konstrui mondan strukturon de ekonomia aplikado de Esperanto, sed ankoraŭ mankas landaj filioj en Eŭropo. En 2019 ni devos solvi la problemon.

En la laborkunsido de IKEF-estraro la vicprezidanto Jas Kawamura fariĝis nova ĝenerala sekretario de IKEF, kaj la prezidanto de IKEF-Ĉinio Vivo Zhang Changsheng iĝis vicĝenerala sekretario de IKEF. La 3a konferenco okazos dum 2019 en Mongolio, kaj la 4a dum 2020 en Japanio.

Chielismo Wang Tianyi



La lasta Internacia Semajno en Katalunio

La kvinan kaj la lastan fojon ni ĝuis la Internacian Semajnon en Salou ĉe la Ora Marbordo. Salou estas grava turisma urbo situanta je 10 km sude de Tarragona. Ĝi estis fondita en la 6a jarcento antaŭ Kristo kaj posedas kelkajn belajn plaĝojn.

Al la 26a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo, okazinta de la 20a de septembro ĝis la 6a de oktobro aliĝis 100 geesperantistoj el 12 landoj. Ni loĝis en la hotelo Best Negresco, kie en 1989a okazis la 41a fervojista kongreso. Post la alveno kaj disdono de dokumentoj ni eksciis pri la semajna programo, kaj la organizantoj parolis pri la estonteco de la ŝatataj Semajnoj, kiuj ne plu okazos en la Kataluna parto de Hispanio.

La dimanĉan inaŭguron ĉeestis la urbestro Pere Granados, kiu kore bonvenigis nin kaj deziris sukceson al la Semajno. Posttagmeze ni promenis en diversaj plaĝoj kaj en la centro de la urbo. Vespere okazis en gaja etoso interkonatiĝo kun ŝaŭm-vino, dolĉaĵoj kaj aliaj manĝaĵetoj. Bele kostumita hispana paro dancis *zarzuelan*, kaj Rosa Lopez muzik-ritme klakis per kastanjetoj.

Dum la Semajno sekvis diskutrondoj pri diversaj temoj, interesaj prelegoj, deklamadoj, komuna kantado kaj videa prezento pri katalunaj folkloro kaj kutimoj. Posttagmeze estis tempo por banado aŭ promonado en naturo ĉe la maro.

Inter la prelegoj necesas substreki tiun de Pere Navarro Rosines “Ĉu vi scias, ke nia manĝo venas de la suno?” Li klarigis la bioĥemian procezon en plantoj, algoj kaj kelkaj bakterioj, pri pigmentoj kaj ĝenerale pri fotosintezo. Ĉio estis ilustrita per multaj bildoj. Barbara Pietrzak el Pollando prelegis pri esperantista komunikado, pri famaj esperantistoj, pri klopodoj ĉe Unesko kaj aliaj interesaĵoj el Esperantio. Zita Blaust el Danlando parolis pri siaj spertoj kaj impresoj dum la 12a Internacia Himalaja Renkontiĝo en Nepalo kaj pri la hinda virino Sindutaj Sankal. Javier Alcalde prelegis kaj diskutigis pri pacismo, pri la roloj de esperantistoj dum la Unua Mondmilito (1914-1918) kaj pri ties influo al la Esperanto-movado.

Abel Montagut prezentis *sian Poemon de Uthoa*. Luz Vázquez gvidis rondon pri esencaj trajtoj de Esperanto-kulturo. Dalia Pileckienė el Litovio parolis pri stereotipa pensmaniero en nia vivo el psikologia vidpunkto. En kelkaj grupoj ni plenumis diversajn taskojn. Ángel Argilos gvidis rondon pri deklamado de poezio en Esperanto. La ĉi-jara Premio Ada Fighiera-Sikorska estis aljuĝita al Barbara Pietrzak, kiu multe laboras por Esperanto. Ŝi persone konis Adan kaj ili komune laboris por Esperanto.

Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

En 2019 AIS studad-sesios en Baltio

En julio 2019 la Sanmarineca Universitata Sesio (SUS) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) denove okazos kadre de granda internacia kunveno. Post la sukcesa SUS35 kadre de la 85a Itala Kongreso en San Marino, la sekva, SUS36, okazos dum la 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-55) en Panevėžys, Litovio.

En 2017, post kvin-jara paŭzo AIS rekomencis regule organizi sian plej altnivelan kunvenon. SUS34 okazis en Varsovio, kaj kiel menciite, SUS35 en San Marino, kaj SUS36 okazos en Litovio.

Unuafoje AIS-sesio estos parto de BET, kaj la AIS-kursoj aperos en la oficiala programo de BET. Simile al la AIS-IKU-inaŭguro dum la UK, en Panevėžys okazos inaŭguro de SUS, kun specimenaj reklamaj gustumoj pri la kursoj okazontaj dum la cetera semajno.

Por SUS36 estas antaŭvidataj kvar-ses kursoj, kun po tri-kvar prelegoj. Fine de ĉiu kurso estos ebleco ekzameniĝi kaj ricevi AIS-ateston. La prelegantoj ricevos rabaton por la aliĝo al BET. Eblas sendi kurso-proponojn al informo@ais-sanmarino.org. Krom kursoj, estas bonvenaj ankaŭ proponoj de ordinaraĵaj prelegoj pri variaj sciencaj temoj.

Pliajn informojn pri AIS kaj SUS eblas trovi rete:

<http://www.ais-sanmarino.org/>



Amri Wandel



Amri Wandel, kiu gvidos la universitatan sesion de AIS en Panevėžys, estas profesoro pri astrofiziko en la Hebrea Universitato de Jerusalemo. Li estas internacie konata esploristo pri nigraj truoj kaj astrobiologio. Profesoro Wandel estas prezidanto de la Israela Asocio pri Astrobiologio (ILASOL) kaj membro de la Internacia Astronomia Unio (IAU). Li estas populara preleganto kaj lekciisto pri astrofiziko kaj astrobiologio, kiujn li instruas en la Universitato de Jerusalemo dum dudek jaroj, ĝis nun al pli ol 2500 studentoj.

En Esperantujo Amri Wandel estas prezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj Sanmarino (AIS) kaj de Esperanto-Ligo en Israelo, membro de la Akademio de Esperanto (ekde 1992), kunordiganto de Internacia Kongresa Universitato (IKU). Li estis prezidanto de TEJO kaj plurfoje estrarano de UEA. Amri Wandel verkis kaj redaktis plurajn sciencajn librojn, inter ili estas ok IKU-libroj kaj la libro *La Kosmo kaj Ni* (premiita kiel plej bona scienca libro, en 2001 kaj 2018).



Panevėžys: Dekanino Daiva Žostautienė, prezidento de LEA Povilas Jegorovas kaj la prezidentino de “Revo” Vida Kulikauskienė post la subskribo de la kontrakto pri kunlaboro.

La Organiza Komitato de BET-55 definitiviĝis

La 15an de novembro la prezidento de Litova Esperanto-Asocio (LEA) Povilas Jegorovas vizitis la urbon Panevėžys por solvi kelkajn organizajn aferojn pri la 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-55). Li kaj la prezidentino de la urba Esperanto-klubo “Revo” Vida Kulikauskienė unue vizitis Panevėžys-an fakultaton pri teknologioj kaj entreprenado de Kaūna Teknologija Universitato. Estis subskribita kontrakto pri kunlaboro inter tiu fakultato kaj LEA lige kun BET-55, okazonta la 6-14an de julio 2019 en ĉi tiu fakultato. Flanke de la fakultato la kontrakton subskribis la dekanino de la fakultato prof. Daiva Žostautienė.

Poste la prezidento de LEA kaj la vicprezidentino de “Revo” Danutė Kriščiūnienė renkontiĝis kun la vicdirektorino de la urba municipa administracio d-rino Sandra Jakštienė kaj pridiskutis organizajn aktualaĵojn de BET-55. Ŝi konsentis esti la unua vicprezidentino de la organiza komitato de BET-55. Poste okazis renkontiĝo kun fakestrino de Panevėžys-a komunuma palaco Dalia Gaspariūnienė pri la kultura programo de BET-55. Estis vizititaj du studentaj domoj, kie loĝos partoprenantoj de

BET-55. Vespere dum kunveno de la Esperanto-klubo “Revo” Povilas Jegorovas rakontis pri aktualaj agadoj renkonte al BET-55 kaj aliajn aktualaĵojn de la esperantista agado en Litovio.

Dum ĉi tiu vizito definitiviĝis la konsisto de la organiza komitato (OK) de BET-55. Ĝi estas tre reprezenta. Dum multaj jaroj LEA strebas agi malferme al la ĝenerala socio kaj aligas al sia agado eksterajn reprezentantojn, aŭ realigas komunajn projektojn kun aliaj organizaĵoj. Jam en la Loka Kongresa Komitato de la 90a Universala Kongreso de Esperanto (Vilno, 2005) estis ne nur esperantistoj, sed ankaŭ reprezentantoj de ekstero. La perfekte sukcesinta Unua Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj (Vilno, 2008) estis organizita de LEA kune kun Litovia Ĵurnalista Asocio kaj en ĝia organiza komitato estis kvar reprezentantoj de tiu asocio. Ankaŭ en la organizado de kelkaj lastatempaj Litoviaj BEToj partoprenis eksteruloj – ekzemple, en OK de BET-49 (Utena, 2013) estis ses reprezentantoj de la urbo, kaj en OK de BET-52 (Birŝtonas, 2016) estis kvin funkciuloj de la urbo Birŝtonas.

En la OK de BET-55 membras la vicdirektorino de la urba municipa administracio d-rino Sandra Jakŝtienė, la gvidantino de la administracio de Panevėžys-a fakultato pri teknologioj kaj entreprenado de Kaŭna Teknologia Universitato Saulė Kairienė, fakestrino de la urba komunuma palaco Dalia Gaspariūnienė kaj la direktorino de la urba turisma kaj informa centro Vilma Bačelienė. Tiamaniere la organizado de BET-55 fariĝas afero ne nur de Litova Esperanto-Asocio, sed ankaŭ de la urbo Panevėžys. Tia kunlaboro ĉiam donas multe pli bonan rezulton, ol se la organizadon prizorgus nur esperantistoj. Per tiaspeca agado LEA provas solvi ĉiaman problemon de esperantista agado – fermitecon.

Krome, en la OK estas ne nur Litoviaj esperantistoj – en ĝi jam dum kelkaj monatoj aktive laboras la Ruslanda verkisto kaj ĵurnalisto, redaktoro de la ĉiumonata bitgazeto *La Ondo de Esperanto* kaj de la novaĵretejo *La Balta Ondo* Aleksander Korĵenkov – tio garantias konstantan kaj regulan informan priservadon de BET-55 antaŭ, dum kaj post la aranĝo. La ĉiutagan gazeton de BET-55 redaktos la fama movada ĵurnalisto kaj instruisto Stano Marček (Slovakio). En la OK membras ankaŭ multaj konataj Litoviaj esperantistoj. Sube estas la plena listo de la organiza komitato de BET-55.

Povilas Jegorovas: prezidanto, kunordigo, ĝenerala gvidado, informado

Sandra Jakŝtienė: la unua vicprezidanto de la organiza komitato, vicdirektorino de la urba municipa administracio de Panevėžys

Vida Kulikauskienė: vicprezidanto de la organiza komitato, prezidantino de la Esperanto-klubo “Revo” de Panevėžys

Danutė Kriŝčiūnienė: vicprezidanto de la organiza komitato, vicprezidantino de la Esperanto-klubo “Revo”

Saulė Kairienė: gvidantino de administracio de la Fakultato pri teknologioj kaj entreprenado de Kaŭna Teknologia Universitato

Dalia Gaspariūnienė: fakestrino de la urba komunuma palaco de Panevėžys
Vilma Bačelienė: direktorino de la urba turisma kaj informa centro de Panevėžys
Irena Alijošiūtė: sekretario, financaj aferoj
Aleksander Korĵenkov: informado pri BET-55
Taesok Choe: retejo de BET-55
Antanas Grincevičius: redaktoro de “Barelo”
Stano Marček: redaktoro de la gazeto de BET-55
Arimantas Račkauskas: rektoro de la somera universitato
Gražina Opulskienė: instruado de Esperanto
Aloyzas Gudavičius: prelegserio pri la litovaj lingvo kaj kulturo
Irena Jagminaitė: libroservo
Antanas Visockas: ekskursoj
Gražvydas Jurgelevičius: fotoservo
Rita Valčiukaitė: registrado, informado
Olga Strojeva: registrado, informado
Asta Nastaravičiūtė: mastrumaj kaj teknikaj aferoj
Vladimir Žuromskij: mastrumaj kaj teknikaj aferoj

Povilas Jegorovas

Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio
Prezidanto de la Organiza Komitato de BET-55

Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.
Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno



Panevėžio (litove: Panevėžys, pole: Poniewież, ruse: Понежеж) estas la Esperanta nomo de la urbo, en kiu Litova Esperanto-Asocio kaj la urba Esperanto-klubo “Revo” en julio 2019 organizos la tradiciajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-55). Legu pli en la artikolo de Vytautas Šilas. (Foto: Turisma Informa Centro de Panevėžys)

Kial veni al Panevejo?

Panevejo (litove: Panevėžys, pole: Poniewież, ruse: Понеvej) estas la urbo, en kiu Litova Esperanto-Asocio kaj la urba Esperanto-klubo “Revo” en 2019 organizos la tradician esperantistan kunestadon Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET). La proverbo asertas: bonokazoj aperas, sed ne ripetigas. Atentu do – ne nur pro BET endas veni la urbon situantan ĉe la bordoj de la rivero Nevėžis.

La urbo Panevejo, la kvina laŭ la loĝantaro urbo de Litovio, situas mezvoje inter du ĉefurboj: la Litovia Vilno kaj la Latvia Rigo. En 2014 Panevejo estis la kultura ĉefurbo de Litovio, kaj specialan atenton oni dediĉis al konatigo de la urbanoj kun kulturoj de aliaj landoj (Ĉinio, Japanio, Francio, Danlando, Svedio, Italio, Germanio k. a.). Nun Panevejo esperas pri reciproka atento de aliaj landoj al si mem. Veturontoj al UK en Lahtio, ne preterveturu senhalte!

La origino de la urbonomo Panevėžys estas klara: ĉar la urbo establiĝis ĉe la rivero Nevėžis, ĝi ricevis la adekvatan nomon: la prefikso *pa-* (apud) + rivernomo = loĝloko apud la rivero Nevėžis. Ĉi tiu 209-kilometra rivero estas la sepa laŭ la longeco litova rivero. La radikon de la rivernomo *vėž* oni derivas de la prahindeŭropa vorto *vaagh*, kiu signifas *brui*, *muĝi*. La negacia prefikso *ne* faras la signifon de la rivernomo *nebrua*: ne-vėžis.

Laŭlegende la Litovia Granda Duko Vytautas la Majesta en 1414 survoje al Vilno ĉi tie rimarkis paganan templon, sed arkivoj pri tio mutas. Dokumente la urboloko estis menciita nur la 7an de septembro 1503 en la Donakto de la Litovia Granda Duko kaj Pollanda Reĝo Aleksandro. Laŭ ĝi la kampo apud la rivero Nevėžis estis transdonita al la paroĥestro de la urbeto Ramygala (24 km sude), devigante tiun konstrui ĉi tie preĝejon (ligna preĝejo estis konstruita en 1507). La paroĥestro ricevis la rajton fondi drinkejon kaj produkti medon, bieron kaj likvoron, konstrui banejon por la lokuloj. Tiel estiĝis la malnova Panevejo.

Kiel vera urbo Panevejo ekkreskis nur en 1873, kiam estis konstruita fervojo al urbo Daugavpils (ruse: Dinaburg, poste Dvinsk), tra kiu jam iris la fervojo Peterburgo-Varsovio. En 1897 la urbo jam estis industriiĝinta – funkciis fabriketoj leda, bombona, alkohola, tabaka. Ĝi havis 12,9 mil loĝantojn; 50,47% el ili estis judoj; 19,58% poloj (fakte pollingvaj litovoj); 12,74% rusoj; 12,13% litovoj; 1,67% germanoj. La Unua Mondmilito konsiderinde influis la nacian konsiston de la loĝantaro. En 1923 el 19,2 mil loĝantoj 53,87% estis litovoj; 36,03% judoj; 5,14% poloj; 3,33% rusoj; 0,57% germanoj. Dum la jaroj 1923-1926 multaj judoj migris al Palestino kaj Usono. En 1939 la loĝantaro kreskis ĝis 26,6 mil.

La evoluon de la urbo kaj la ŝanĝiĝon de la loĝantaro grave influis la Sovetunia okupacio en 1940, reokupacio en 1944, naziaj kaj komunistaj reprezalioj, likvido de la sendependeco de Litovio. Multaj litovoj spertis ekzilon al profundaj regionoj de



En la malnova Panevejo

Sovetunio. Senkompata plago atingis la judan loĝantaron – la plimulto de la iamaj Paneveĵaj judoj pereis kiel viktimoj de la kruela nazia holokaŭsto. Inter la pereintoj estis ankaŭ prezidanto de la Paneveĵa Esperanto-Asocio Jakobo Kanas (1900-1941), esperantisto ekde 1922, instruisto de pluraj Esperanto-kursoj.


Post la Dua Mondmilito la duondetrinitaj urbaj entreprenoj estis rekonstruitaj, aperis kelkaj novaj grandaj industriaj entreprenoj. Apud la urbo lokiĝis Sovetuniaj armeaj bazoj. Alvenis multaj rusparolantoj. Nun en Paneveĵo, kiu havas preskaŭ 100 mil loĝantojn, litovoj faras 96,1% de la loĝantaro, rusoj – 2,4%, ukrainoj 0,3%, poloj 0,2%. Judoj? En la urbo, iam duone juda, nun loĝas nur iom pli ol cent judoj.

La mondmilitaj detruoj kaj brulegoj pereigis multon el la memorinda pasinteco, tamen iom da malnovaj vizitindaĵoj kaj vidindaĵoj postrestis. La plej malnova konstruaĵo de la urbo datiĝas je 1614. Ĝi estas arkivo de terenoj kaj juĝejoj de la 17a-18a jarcentoj. Imponas la riĉa etnografia muzeo en la domo de la litova nobelo Moigys el la 19a jarcento.

Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



La katalogo de la plej granda Ruslanda biblioteko nemiskompreneble sciigas, ke la biblioteko havas plian ĝis nun nekonatan broŝuron de D-ro Esperanto! Vere sensacia trovaĵo! Restas nur mendi ĉi tiun libron por ke ĝia kovropaĝo ornamu la artikolon en *La Ondo*.

Zamenhof protestas, aŭ: Neokazinta sensacio

Inter preskaŭ 50 milionoj da diversspecaj eldonaĵoj (libroj, gazetoj, mikrofilmoj, bit-eldonaĵoj k. m. a.) en la Ruslanda Ŝtata Biblioteko (Российская государственная библиотека = РГБ, RGB) estas miloj da libroj en/pri Esperanto, inkluzive de multaj raraĵoj. Antaŭ jardeko, verkante *Homaranon* mi kelkfoje laboris en ĉi tiu biblioteko, la plej granda en Ruslando.

Feliĉe, lastatempe la serĉado en RGB iĝis multe pli facila danke al la retserĉilo. Helpe de ĉi tiu serĉilo antaŭ tri jaroj ni trovis plian Praesperanton el la 1886a jaro de Ludoviko Zamenhof (LOdE, 2016, №8-9, p. 18-19; <http://sezonoj.ru/2016/12/zamenhof-11/>).

Ni venu al la retejo de RGB kaj provu serĉi librojn, kiuj enhavas la vorton “эсперанто”, kaj, ĉar tiuj estas ege multaj, ni elektu la jaron 1892. La serĉilo afable listigas kvar eldonaĵojn, inter kiuj la unua estas jena.

Изданы с 1892 ✕ | Изданы по 1892 ✕ | [очистить все фильтры](#)

Результатов: 4, страница 1 / 1 (0.583 сек.) [Внешние ресурсы: 151](#)

1

Азбука-самоучитель, по которой очень быстро можно научиться четко, красиво, бегло и самобытно писать по-русски / Сост. д-р Эсперанто [псевд.] в С.-Петербурге. - Вольск : М.Я. Соков, 1892. - 8 с.; 22. [ещё](#)

[Описание](#) [Проголосовать за оцифровку](#)

La biblioteka slipo tekstas:

Азбука-самоучитель, по которой очень быстро можно научиться четко, красиво, бегло и самобытно писать по-русски / Сост. д-р Эсперанто [псевд.] в С.-Петербурге. - Вольск: М. Я. Соков, 1892. - 8 с.; 22. (Abocolibro-memlernilo, laŭ kiu tre rapide oni povas ellerni klare, bele, rapide kaj originale skribi ruse / Komp. d-r Esperanto [pseŭd.] en S.-Peterburgo. – Voljnsk: M. Ja. Sokov, 1892. – 8 p.; 22 [cm.]).

Ĉu plia nekonata verko de nia Majstro? Vere sensacia trovaĵo!

Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Jubileoj kaj memordatoj en decembro 2018

1. Antaŭ 110 jaroj mortis **Léonce Vallienne** (1854-1902-1908), en Esperanto ofte nomata Henri Vallienne, franca kuracisto, poeto kaj esperantisto; aŭtoro de la pioniraj E-romanoj *Kastelo de Prelongo* (1907) kaj *Ĉu li?* (1908), tradukinto de *Eneido* kaj de aliaj verkoj, kunfondinto (kun Ch. Verax) de *Internacia Revuo Medicina* (1906), kunfondinto kaj la unua vicprezidanto de Tutmonda E-ista Kuracista Asocio (1908). — Legu pli en NDK, p. 290-291.

3. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis **Nikolaj Nikolajevič Rytjkov** (Рытѣков, 1913-1926-1973), rusa aktoro kaj esperantisto, arestita en marto 1938 pro kontraŭsoveta agado kaj kondamnita al okjara punlaborado, post kiu li estis ekzilita ĝis novembro 1955; li ofte deklamis poemojn kaj prozaĵojn en Eo, el kiuj 18 aperis en la 44-minuta sondisko *Elektitaj eroj* (1971); ekde 1965 loĝis en Britio.

4. Antaŭ 85 jaroj mortis **Fabian Markoviĉ Zamenhof** (1868-1933), frato de la aŭtoro de Esperanto, konata kiel Felikso Zamenhof kaj FEZ, aŭtoro de E-poemoj.

14. Antaŭ 80 jaroj naskiĝis **Fabrizio Pennacchietti** (1938-1953-), itala filologo (profesoro pri semidaj lingvoj) kaj esperantisto; membro de la Akademio de Esperanto (1979-89); fonda membro, senatano kaj prezidanto (2008-11) de AIS.

15. **Tago de la Esperanta Libro**, festata je la naskiĝdatreveno de **Lazarj Markoviĉ “Ludoviko” Zamenhof** (1859-1917), iniciatoro de Esperanto.

15. Antaŭ 95 jaroj naskiĝis **Đào Anh Kha** (1923-1947-2012), vjetnama ĵurnalisto, verkisto kaj esperantisto; kunfondinto kaj ĝenerala sekretario (1956-79) de VPEA, redaktoro de *Informado el Vjetnamio* (1956-75); aŭtoro, tradukinto kaj redaktoro de pluraj E-libroj, membro de la Akademio de Esperanto (2004-12), honora membro de UEA (2001). — Legu pli en NDK, p. 68-69.


16. Antaŭ kvin jaroj mortis **Helmar Frank** (1933-1974-2013), germana kibernetikisto kaj esperantisto; realiginto de la propedeŭtika projekto “Lingvo-Orientiga Instruado” (1975-82), prezidanto de la Eŭropa Klubo (1974-2009), iniciatinto kaj la unua prezidanto (1983-2007) de AIS, aŭtoro de pluraj E-libroj kaj artikoloj, rektoro de IKU en la 75a UK (Havano, 1990), la Esperantisto de la Jaro 2004. — Legu pli en NDK, p. 96-98.

22. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis **Jaroslav Mařík** (1913-1934-1997), ĉeĥa patent-juristo, ĵurnalisto kaj esperantisto, kunlaborinto de *La Verda Stacio* kaj de la E-programo de Radio Prago; aŭtoro kaj tradukinto de pluraj libroformaj kaj gazetaj verkoj, inkluzive de biografij, bibliografij kaj historiaj artikoloj, pro kiuj li estis nomita “marŝanta enciklopedio pri la movado”, honora membro de UEA (1992).

25. Antaŭ kvin jaroj mortis **Ljubomir Trifonĉovski** (1958-1973-2013), bulgara pup-teatra dramaturgo kaj esperantisto; aŭtoro kaj tradukinto de kelkaj E-libroj, ĉefredaktoro de *Literatura Foiro* (1996-2013), sekretario de la Esperanta PEN-Centro (2008-13), vic-konsulo de la Esperanta Civito (2002-13).

Aleksander Korjenkov

Kulturo



“Ĉi tiun novelon de-vas tra-le-gi kaj parkerigi ĉiu civitano el ĉiuj ducent milionoj da civitanoj de Soveta Unio”, – Anna Aĥmatova diris al Lidija Ĉukovskaja, traleginte la verkon *Unu tago de Ivano Denisoviĉ*. Ĝia aŭtoro Aleksandr Solĵenicyn naskiĝis antaŭ cent jaroj, la 11an de decembro 1918. Okaze de la jubileo ni aperigas la komencon de la novelo, verkita en 1959 kaj mirakle aperinta en la novembra numero de *Novyj mir* en 1962.

Unu tago de Ivano Denisoviĉ

Kiel ĉiam, je la kvina horo matene sonoris la veksignalo – martelbato kontraŭ la relon, pendantan ĉe la staba barako. La tremanta sonoro mallaŭte aŭdiĝis tra la vitroj, kiujn tavoloj du fingrojn larĝa glacio, kaj baldaŭ finiĝis. Estis malvarme, kaj la gardisto ne deziris longe svingadi sian brakon.

La sonoro ĉesis, sed post la fenestro estis nur la sama mallumo, kia estis nokto-meze kiam Ŝuĥov* iris al la baraka latrino, kaj tra la fenestro videblis tri flavaj lanternoj: du en la gardozono kaj unu en la lagero*.

Ial neniu venis por malŝlosi la barakon, kaj ne estis aŭdeble, ke helpdeĵorantoj prenas per du bastonoj la latrinan bareleton por porti ĝin.

Ŝuĥov neniam dormis post la veksignalo, li ĉiam ellitiĝis laŭ ĝi – ĝis la apelo restis unu kaj duona horo da sia propra, nereglamentita tempo, en kiu bonaj konantoj de la malliberula vivo ĉiam povas iom perlabori: kudri por iu gantujon el uzita subŝtofo; doni al riĉa brigadano sekajn feltbotojn por ke tiu ne trotu nudpiede ĉirkaŭ la bot-amaso, serĉante ilin; aŭ kuri tra la deponĉambroj, serĉante iun taskon, ekzemple, balaadon aŭ portadon; aŭ iri al la manĝejo por kolekti la malplenajn bovlojn sur la tabloj kaj porti ilin al la lavejo – sed ĉar tie oni ankaŭ nutras, dezirantoj pli multas ol necese, kaj ĉefe, se en la bovloj io restas, estas malfacile deteni sin de lekado. Kaj Ŝuĥov bone memoris la vortojn de sia unua brigadestro Kuzjomin, spertega malliberulo, kiu tiam, en 1943, malliberis jam dek du jarojn kaj foje ĉe arbara lignofajro diris al siaj novaj subuloj, venigitaj el la fronto:

– Ĉi tie, knaboj, estas tajga leĝo. Sed homoj ankaŭ ĉi tie vivas. Tiuj mortaĉas en la lageroj: kiuj bovlojn lekas, kiuj je kuracejo esperas, kaj kiuj denuncas al la baptopatro*.

Nu, pri la denunculoj li malpravus. Tiuj estas singardemaj. Sed ilia singrademo estas bazita sur fremda sango.

Ŝuĥov ĉiam ellitiĝis laŭ la signalo, sed ne hodiaŭ. Ankoraŭ vespere li nebone fartis, sentante jen febron, jen ostodoloron. Kaj nokte li ne sukcesis varmiĝi. Tra la dormo al li ŝajnis, ke li jen tute malsaniĝas, jen iom resaniĝas. Kaj li deziris, ke la mateno ne venu.

Tamen la mateno venis en sia ĝusta tempo.

Sed ne eblis varmiĝi, ja la fenestroj estis glacikovritaj, kaj laŭ la linio, kie kuniĝis la muroj kaj la plafono, tra la tuta grandega barako estis blanka araneaĵo – prujno.

Ŝuĥov ne stariĝis. Li kuŝis sur la supro de sia tabullito, komplete kovrinte sin per siaj litkovrilo kaj malliberula palto, kaj ŝovinte ambaŭ piedojn en subfleksitan manumon de sia vatita jako. Li vidis nenion, sed laŭ sonoj li komprenis ĉion okazantan en la barako kaj en la baraka fako de lia brigado. Jen, peze paŝante en la koridoro, la helpdeĵorantoj ekportis unu el la oksitelaj latrinbareloj. Tio estas taksata kiel facila laboro por invalidoj, sed provu porti tiel, ke nenio elverŝiĝu! Jen en la 75a brigado brue falis planken aro da feltbotoj alportitaj el la sekigejo. Kaj jen same la niaj (hodiaŭ estis ankaŭ la vico de nia brigado por sekigi la feltbotojn). Jen la brigadestro kaj la vicbrigadestro senvorte surmetas la piedvestojn, kaj ilia tabullito knaras. La vicestro tuj iros al la pantranĉejo, kaj la brigadestro – al la laborplanistoj en la staban barakon.

Kaj ne simple al la planistoj, kiel ĉiutage, – Ŝuĥov rememoris, ke hodiaŭ estos decidita ilia sorto, ja oni volas peli ilian 104an brigadon el la konstruado de laborejoj al la nova loko Socbytgorodok*. Ĝi estis senarba neĝkovrita kampo, kaj antaŭ ol ekkonstrui ion tie, oni devos fosi truojn en la grundo, entruigi fostojn kaj instalii pikdraton, por ke ili mem ne povu fuĝi. Kaj nur poste komenciĝos la konstruado.

Tie dum monato oni certe ne havos eĉ kabanon por varmiĝi. Kaj ne eblos fari lignofajron – per kio oni nutru la fajron? Nur energia laboro povos esti la savo.

La brigadestro do havas zorgojn. Li iros por solvi la aferon tiel, ke tien estu sendita ne ilia, sed alia, malpli eltrovema brigado. Evidente, kun malplenaj manoj ne eblas interkonsenti. Necesas porti al la ĉefplanisto duonkilogramon da lardo. Aŭ eĉ unu kilogramon.

Nu, provo ne estas maltrovo, kial li ne provu eviti la laboron por unu tago en la kuracejo? Ja la tuta korpo doloregas lin!

Kaj krome – kiu gardisto deĵoras hodiaŭ?

Li rememoris: deĵoras Ivano-kaj-duono, magra kaj alta nigraokula serĝento. Unuavide li ŝajnis tre timiga, sed poste oni eksciis, ke el ĉiuj deĵorantoj li estas la plej pacema: li neniam enkarcerigas, nek trenas al la reĝimestro. Do eblas kuŝi almenaŭ ĝis la foriro de la naŭa barako al la manĝejo.

La tabullito skuiĝis kaj ŝanceliĝis. Du personoj samtempe forlasis siajn kuŝejojn: supre – la anabaptisto Aljoŝka, la najbaro de Ŝuĥov, kaj sube Bujnovskij*, eksa mararmea kapitano de l' dua rango*.

La du maljunaj helpdeĵorantoj, elportinte ambaŭ latrinajn barelojn, komencis kvereli, decidante kiu el ili iru por boligita akvo. Ili kverelis senĉese, kiel inaĉoj.

Veldisto el la 20a brigado muĝis al ili:

– Hej, vi febluloj, – li ĵetis al ili sian feltboton. – Mi tuj pacigos vin!

La boto obtuze frapis foston. La du eksilentis.

En la najbara brigado mallaŭte basis la vicbrigadestro:

– Bazilo Fjodoroviĉ! Tiuj kanajloj en la proviantejo friponas. Devus esti kvar naŭcentgramaj panoj, sed jen nur tri.* Al kiu ni donu malpli?

Li parolis mallaŭte, sed la tuta brigado aŭdis kaj silentiĝis: ies porcioj ĉi-vespere estos magraj.

Ŝuĥov plu kuŝis sur la kunpremitaj segaĵoj de la maldika matraco. Se venkus unu el la du statoj – aŭ la febro tremigus lin aŭ la ostoĵ ĉesus dolori lin. Sed estis nek tio, nek alio.

Dum la anabaptisto flustre preĝadis, Bujnovskij revenis el la ekstera latrino kaj kvazaŭ malice anoncis, adresante sin al neniu:

– Prepariĝu, ruĝaj maristoj! Ne malpli ol tridek gradoj!

Ŝuĥov do decidis iri al la kuracejo.

Sed tuj ies aŭtoritata mano forĵetis de li la kovrilon kaj la jakon. Ŝuĥov forĵetis la palton, kiu kovris lian vizaĝon, kaj duonlevis sin. Sub li, kun la kapo je la nivelo de l' supra lito, staris la magra Tataro.

Evidente li deĵoris ekstervice kaj sukcesis veni nerimarkite.

– Ŝĉo okcent kvindek kvar*! – la Tataro legis la numeron sur la blanka flikaĵo dorse de la nigra palto. – Tri tagoj da karcero kun la kutima laboro!

Apenaŭ aŭdiĝis lia speciala obtuza voĉo, en la tuta duonmalluma barako, kie ne ĉiuj lampoj lumis, kie sur kvindeko da cimoplenaj tabullitoj dormis ducent viroj, tuj aktiviĝis kaj komencis rapide vestiĝi ĉiuj, kiuj ankoraŭ kuŝis.

– Pro kio, civitano estro*? – Ŝuĥov demandis, doninte al sia voĉo pli da ploremo, ol li sentis.

Karcero kun la kutima laboro estas nur duonkarcero, ja li ricevos varman manĝon kaj ne havos la tempon por amaraj pensoj. La plena karcero estas sen forlaso de ĝi.

– Ĉu vi levis vin laŭ la signalo? Iru al la komandejo, – la Tataro klarigis pigre, ĉar li, Ŝuĥov kaj ĉiuj ceteraj bone komprenis la kialon de la enkarcerigo.

Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



La novjarfesto kaj Kristnasko, kiujn garnas pluraj feriaj tagoj, estas la plej ŝatata festaro por infanoj, kiuj gajas-ĝojas, rondodancas, ricevas donacojn, kaj foje mirigas siajn parencojn per netrivialaj demandoj kaj respondoj. Nia deĵoranta humoristino Kukucapa N. plukis kaj tradukis kelkajn kaŝaŭskultitajn dialogojn.

Gajan Kristnaskon kaj Bonan Jaron 2019!

Unuvokalaj verkoj

Dum la 16a Novjara Renkontiĝo (2017/18) en Saarbrücken, ateliero de vortludemuloj klopodis, sub ferma gvidado de István Ertl, produkti kiel eble plej longajn Esperantajn tekstojn uzante nur unusolan vokalon. (La inspiron donis la hungara ludo nomata ĝuste “eszperente”, kiu permesas nur la plej ofte uzatan hungaran vokalon.) Jen la rezultoj pri “A” kaj “I”



Praarbara kamarad', vana kaj vanta frat', marmalama kamparan' kantaĉas.
Ŝanĝata masaĝ' aĝas, aĉas.

Mankas agad'. Fanfara parad' pasas tra srat'. Al aga farad'!

Papaga gapad': samaĝa papag' algapas. Gabalda gargaras.

Malpala, kabala bal' plaĉas, ĉar samtaga karavan' al maskarada karnaval' malpacas. Marŝantar' rampas al la dalmata plaĝ', al mara plaĝar'!

Ĉarma, bastarda pap' malsatas al papa pladar'. Pap' tagmanĝas. Manĝatas malfatras': albana anas', amara ananas', banala bananar', maĉata asparag-salat', japana salam', pastaĵa kaĉ', tas' da ĉampan'. Samaĝas pap', pan' kaj salam': malagrable al la palat', malsana manĝaĵaĉar'. Malgranda manĝantar', malgraŭ malsat' malklara sanstat'.

Damaĝa skarab' skrapas al rabarba arb'. Barba barbar' batas al fatrasa skarab'.

Baldaŭ aŭ malbaldaŭ altas tatara amat', kvazaŭ Ararat', anstataŭ katarakta kat' aŭ kampara rat'.

Pasas vana, laca, barakta, malavantaĝa tag'. Falsa alarm'.



Mistifiki pli? Plisimpligi?

Fi, mi iris pisi.

Mi mispisis. Mi pripisis ŝin. Ŝi priridis min. Mi ŝvitis, ĝis ŝi kisis min. Ŝi min instigis, inspiris; mi ŝin inigis, inicis, incitis.

Ŝi sibilis. Ni pli flirtis, ni disŝiris nin. Ni glitis pli, ni disiĝis, ni disiris.

Ŝi miris pri fiŝ-kis': Filip ŝin lip-kisis! Mi ĝisis, mi invitis ilin, ili min ridindigis.

Mi finis citi min.

Ĝis!

Dialogoj ĉe la festa abio

- Paĉjo, ĉu vi scias, kiu trajno plej malfruas?
 - Ne, mi ne scias. Sed kiu, fileto?
- Tiu trajno, kiun vi promesis donaci al mi okaze de la pasintjara Novjarfesto.

La 31an de decembro vespere filo proponas al sia patrino:

- Kiam estos duono antaŭ la 12a ni ekkriu: “La Nova jaro! Nova jar!”
 - Sed por kio?
- Por ke niaj najbaroj pensu, ke al ni la Nova jaro venis pli frue ol al ili.
- Avinjo, laŭ via konsilo mi metis la donacon por mia frateto sub abio!
 - Kaj? Ĉu ĝi plaĉis al li?
 - Mi ne scias. Li ankoraŭ serĉadas ĝin. La tajgo estas vasta!

La filo venas al la kuirĉambro kaj diras al sia patrino:

- Panjo, tie la abio brulas.
- Fileto, ĝi ne brulas, sed brilas.

Post kvin minutoj la fileto denove enkuras kaj raportas:

- Panjo, jam la kurtenoj kaj la ŝranko brilas.

Patro kun sia filo ornamas la festan abion. La filo demandas:

- Paĉjo, kial vi pendigas bombonojn tiel alte?
- Por ke vi ne formanĝu ĉiujn bombonojn antaŭ la alveno de l' Nova jaro.
 - La filo diras:
 - Ĉu mi, do, ĝis la Nova Jaro manĝu nur paperstriojn?

Plukis kaj tradukis **Kukucapa Nemaskovskaja**



Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Ĉu sur ĝusta vojo?

Monda organizo agnoskinta Esperanton (*Tagiĝo*: Cirkulero de Esperanto-Junularo ĉe Kulturdomo de Petr Bezruč en Opava, marto 1958, krucenigmo, p. 16)

Du misnaskitoj

Sekvas noveloj de niaj samtempuloj: *Muta nature...* kaj *Bastardo...* (Halina Gorecka: *Beletra Almanako*, 2018, №31 // *La Ondo de Esperanto*, 2018, №10, p. 58)

Originala membrokampanjo, aŭ: Konstruu malkotize

Ne aliĝu al UEA ... por subteni ĝin. (Renato Corsetti, 24 nov 2018, <https://www.facebook.com/groups/esperanto.grupo/permalink/10156590237260289>)

La tenton de akuzativon

Grandan atenton ricevas la evoluon de TEJO... (La deka numero de *Heroldo* en 2018 <http://esperantio.net/index.php?id=3624>, stato 5 okt 2018)

Ideo osa por forum' kaosa

Yu Zhengsheng iniciatis kvar proponojn por la duborda forumo (titolo de artikolo, 3 maj 2015, <http://esperanto.cri.cn/581/2015/05/03/177s176019.htm>)

El duba ordo, nuba birdo

...daŭre helpi al la dubordaj junuloj reagligi sian revon... (samloke)

Ŝtupoj al plena posedo?

Kial la organizantoj metis du peronojn de mala sekso en la saman ĉambron ("IJK-partoprenanto", 10 aŭg 2018, <https://www.liberafolio.org/2018/08/09/ijk-ano-forpeli-ta-post-seksa-agreso/#comment-2232>)

ILEI kun ŝtata kompetento?

Organizaj aspektoj de la laboro de ekzekutivo estis prezentitaj fare de la prezidanto. (La kultura heredaĵo de Esperanto – prelego de Mireille Grosjean, prez. de ILEI, 14 aŭg 2018, http://esperanto.cri.cn/2521/2018/07/31/165s200236_1.htm)

Ĉu kaŝan rolon ludas kaserolo?

La patoprenantoj... klare montris ke ili eĉ pretus aliĝi al UEA, se iu petus ilin papere aŭ ret-mesaĝe, kvankam ili ne sentas, ke estas iu ajn praktika avantaĝo aliĝi al UEA. (Corsetti insistas pri la sinko de UEA // HeKo 683 7-A, 12 jul 2018, <http://www.esperantio.net/index.php?id=3558>)

Se en via lando estas peranto de *La Ondo de Esperanto*, pagu al tiu en via landa valuto. Ni havas perantojn en pluraj landoj. Vidu la liston de la perantoj ĉi-sube.

Se vi havas konton ĉe UEA, sendu ĝirilon por 15 eŭroj al la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo), kopie al nia redakcia adreso rete (sezonoj@kanet.ru) aŭ poŝte (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando – Россия). Nia UEA-konto “avko-u”.

Vi povas uzi la internacian monpagan sistemon PayPal, vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Ruslandanoj pagu 850 rublojn al Галина Романовна Горецкая poŝte (RU-236039, Калининград, аб. ящик 1205), banke (petu informojn pri la kontonumero). Ni akceptas pagojn ankaŭ per Яндекс.Деньги (konto 4100138523456, informu retpoŝte pri la pagonumero), vidu pli en <http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>.

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Argentino: Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla — 52, CP 5507 — Vistalba, Luján de Cuyo Mendoza. Rete: rosar@fibertel.com.ar.

Aŭstralio: Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016. Rete: libroservo@ans.com.au.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg. Rete: aon.913548977@aon.at.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-902 Brasília-DF. Rete: bel@esperanto.org.br.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadeŝda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: Cea.polnicky@quick.cz.

Ĉinio: Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jinqiao Touzi Gongsi, Jingchuan-Xian Nonglin-lu, Pingliang Gansu, CN-744300. Rete: agrikulturo@126.com.

Danlando: Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø. Rete: arne-casper@email.dk.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzner, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: libroj@esperanto-buecher.de.

Hispanio: Pedro A. Garrote, C/Las Mercedes, 5-5°-C ES-47006 Valladolid. Rete: hiperanto.uea@terra.com.

Hungario: Esperanto-Centro Eventoj, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapeŝt. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapeŝt, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Irlando: Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio, p. k. 1081, IS-121 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: f-esp-it@libero.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tôkyô-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008 E-08204 Sabadell, Katalunio. Rete: v.sole@esperanto.cat.

Koreio: KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703. Rete: kea@esperanto.or.kr.

Kroatio: Marija Beloŝević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: mbelosev@public.carnet.hr.

Latvio: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga. Rete: margarita.zelve@gmail.com.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Meksiko: Mallely y/o Magdalena Martínez Mateos Av. 523, No.187, 1a Sección de San Juan de Aragón, Del. Gustavo A. Madero, México D.F., CP 07969, México. Rete: ondo@esperanto-mexico.org.

Nederlando: Univerala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Rete: ionel@co.uea.org.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: akbondhus@jkn.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Pollando: Pola Esperanto-Asocio, ul. Andersa 37/59a, PL-00-159 Warszawa. Rete: sekretario@esperanto.pl.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: sezonoj@kanet.ru.

Serbio: Miomirka Kovačević, Španskih boraca 32, RS-11070 Novi Beograd. Rete: miomirka.kovacevic@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: revuo@stonline.sk.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Ĝi estas demonstra versio de la 71-paĝa decembra Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>